



Subtene al la regiona, landa kaj loka agado



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

ENHAVO n-ro 48 • AMO 90 • Brazilo • Viki • Bulgara konkurso <aŭgusto 30

AMO 90 okazigita en la itala kongreso

Jen ĉefe postkreita teksto pri la enkonduko SMG:

“Mi ĝojas malfermi la AMO-seminaron 90 ene de la itala kongreso, kun gravega temo: ‘Kiel starigi kaj prizorgi sociajn retejojn.’ Tiuj vole-nevole estas potencaj komunikiloj, kaj gravas, ke vaste la esperantistoj sciu majstri la uzadon: tion povos fari ĉiu pli teknike kapabla ol mi, kaj tio ampleksas dekojn da miloj da homoj. Ne necesas esti estrarano aŭ alta oficanto, ĉiu ajn unuopa esperantisto povas eniri la debatojn kaj prezenti la lingvon kaj pledi por ĝi.

Aparte salutinda estas la elstara rolo de Italio en la AMO-programo. Jam en la unua jaro de AMO (2014), Italio gastigis seminarion en Fai de la Paganella, supre de Trento. En la sekva jaro, okazis la deka seminario ene de IJF, la paska junulara aranĝo, kun valora trejnado liverita de kajper TEJO, supre de Aosta, laŭ neimageble kurba-kruta alira vojo. Sekvis seminarioj en San Bernadetto, unu de IFEF, unu de IEJ. Ja okazis pliaj seminarioj tra la jaroj.

Ekde la enoficiĝo de la nuna Estraro de ILEI, en la kampo de instruado, vere elstaras Italio, kun du estraranoj de ILEI kaj la gastigo de la Kongreso de ILEI en 2023. Menciindas la programo “30 oraj horoj de Esperanto”. kaj la laboro por komuniki la agadon de la Ligo tra sociaj retejoj.

Pro ĉiuj tiuj kialoj, la nuna seminario estas aparte bonvena kaj laŭdinda.”

Sekvos artikolo de Debora Rosetti pri la seminario temo.

Brazila kursa verkinto rekonita de UEA

Adonis Saliba (Brazilo) ricevis rekonon pro ‘Elstara Agado’ pro la multjardeka fortigo de la E-komunumo kaj pro la laboro pri instruado de Esperanto en Brazilo, inkluzive kadre de la projekto ‘Nesto’ kaj la lastatempe furora programo *Mia Amiko*, per kiuj ĉiujare plurcentoj da homoj pere de la portugala lernas Esperanton kaj kadre de kiu kunlaboras sub lia kunordigo dekoj da instruistoj.



Bronŝtejn kaj papilioj en aŭtuno

Nova filmeto: Mikaelo Bronŝtejn kantas en Esperanto: Papilia aŭtuno.

<https://www.youtube.com/watch?v=tvxY0wWl4fo>

Bv. "ŝati", komenti, aboni la kanalon.

Dima kaj Anna

Literaturo el Bulgario – la kutima konkurso

Hristo Gorov - Hrima - estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj. La konkurso estos por rakonto kaj eseo.

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto. La konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton kun supersignoj. La aŭtoroj indikusian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plenaj poŝtadreso, telefono kaj ret-adreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman - 12 punktaj

La gajnintoj ricevos valorajn premiojn. Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la **31-a de oktobro 2022** al la adreso: e-mail: modest@abv.bg

Sendis: Georgi Miĥaiklov

Edukado net aktivis en la UK

<Edukado.net> aktive kontribuis al la programoj de la montreala UK. Katalin kaj Sylvain jam antaŭ la kongreso **okazigis dutagan intensan preparkurson (AVEK)**, kiun partoprenis ok personoj, kun la celo ekzerci sin en la parolado, prepari sin al la ekzamenoj kaj lerni orientiĝi pri la kongreso kaj ties programoj. Dum la kongreso, du el la kursanoj plentempe volontulis kiel teknikaj helpantoj.

La unua oficiala programo, kie nia retejo, kune kun la programo **Ekparolu!** kaj la KER-ekzamenoj povis prezentiĝi estis la **Movada Foiro**, dum kiu ni funkciigis tri tablojn kaj sukcese informadis pri niaj agadoj kaj programoj. Ĉe la tablo de **Ekparolu!** deĵoris Margaret Zaleski-Zamenhof. Edukado.net kune kun la loka kongresa komitato revivigis la aktivajon **PINĈILUMADO**, por helpi al novaj esperantistoj ekhavi konversaciojn kun spertuloj. Pri tiu paroliga ludo nia redaktoro havis la eblon paroli al la tuta kongreso dum la festa malfermo, dimanĉon matene.



Dum la kongreso dum kvar tagoj ni gvidis **paroligajn kursojn je du niveloj**, kiujn partoprenis averaĝe po 25-30 personoj en ĉiu grupo. Ses lecionojn de la

porkomencanta grupo asistis ankaŭ Margaret Zaleski-Zamenhof, kio tre stimulis la partoprenantojn.

Komence de la semajno, kadre de la **KLERIGA LUNDO** Sylvain gvidis la programon *Renkontiĝo kun bestoj*, dum Katalin prezentis la **KER-ekzamenojn de UEA** kaj respondis al la rilataj demandoj de la publiko. Post la programo pluraj ĉeestantoj aliĝis al la kongresa sesio de la KER-ekzamenoj, kies parola parto je ĉiu nivelo okazis marde. La dua ekzamentago okazis vendrede. **Al la ekzameno de UK aliĝis 26 personoj**, sed komencis siajn ekzamenojn nur **21 kandidatoj**. Bedaŭrinde kelkaj eĉ ne atingis Kanadon pro vizaj problemoj, aliaj infektiĝis pro kovimo kaj ne povis ĉeesti la vendredajn partojn. Por ili ni serĉos aliajn eblojn je ekzameniĝo.

Katalin per prelego kontribuis al la programo **Tago de Lernado** de ILEI. Ĵaŭdon nia redaktoro **donis kelkajn intervjuojn kaj kunsidis kun Chuck Mays kaj Mark Fettes, estraranoj de ESF**, kun la celo difini la laborplanon por la rekonstruo de la paĝaro, kies unua paŝo estos detala priskribo de la funkcioj kaj trovo de programistoj. <Edukado.net> prezentiĝis en la **forumo de fakaj agadoj** per reklamfilmo, Sylvain kaj Katalin estis invititaj al la **ESF-akcepto**, kies ĉefa programero estis la lanĉo de la Fonduso Tonkin cele al novaj iniciatoj.

Vidu fotojn en nia fotoalbumo aŭ en la montrealaj albumoj de nia Facebook-paĝo.

Katalin Kovats

Pli pri la nova faka asocio pri Vikimedio

La listigitaj taskoj montras la vastecon de la laboro de UEA. Fakte, mi persone nuntempe prizorgas similan varbadon de talentuloj en Vikimedio EO (VMEO). La listo kaj priskribo kreita de VMEO multe fokusiĝas pri vikimedia laboro, sed parte estas ĝenerala. Mi ĝin ligas sube, se vi (ĉu UEA, ĉu landaj kaj fakaj asocioj) volus inspiriĝi per alia perspektivo. (vi eĉ povas komenti pri vortumo aŭ proponi propran komentante unuopan ĉelon per Ctrl + Alt + M)

<https://docs.google.com/spreadsheets/d/1CvATUZGQ8zHgCO15kqATVlw6H-bFP9cmgnPIT2bmbY/edit#gid=0>

La proponita maniero por kandidatiĝi al UEA kun kutimaj entreprenaj dokumentoj povas aspekti iom strange por kandidatiĝado de volontuloj. Sed ĝi ja taŭgas por kandidatiĝoj de eble pagotaj laboristoj.

Denove mi prezentas la manieron uzatan nun en VMEO, por ke vi povu inspiriĝi. Interesiĝanto pri volontulado simple markas rolo(j)n, pri kiu(j) li / ŝi interesiĝas, konfirmas per butono "SIGN UP!" kaj en sekva paŝo respondas al demandoj por specifaj roloj (dume en VMEO por plejparto de roloj ne estas difinitaj aldonaj demandoj; ni aldonas ilin iom-post-iom; por vidi kiel tio funkcias vi povas elekti la rolon "tradukanto de programaro") kaj fine denove konfirmas. Mi konsideras, ke granda oportuno de tiu ĉi maniero estas, ke kandidatoj por volontulado estas aŭtomate registritaj en la sistemo kaj facilas ilin trakti ciferece, ekz. sendi al ili amasan retpoŝton.

<https://esperanto.wiki/civicrm/vol#/volunteer/opportunities>



KuboF Hromoslav (Michal Matúšov)

Medicinistoj anoncas konkurson por fakuloj

Verkado de priskribo de interesa medicina kazo estas literatura artaĵo en si mem: ĝi komenciĝas per bona medicina observado, per kiu komence evidentiĝas, ke iu kazo havas ion interesan, instruan kaj nekutiman. Ĝi postulas scipovon klare kaj koncize resumi la kazon kaj la elektitan kuracadon kaj fine bonan regadon de lingvo por fari la kazraporton bone legeblan. Tre bedaŭrinde la artformo de medicina kazraporto hodiaŭ estas ofte neglektita en medicina edukado, kvankam majstroj kiel [Oliver Sacks](#) kaj [Alexander Lurija](#) konsideris ĝin kulmino de medicin-verkista majstreco, kiu samtempe donas al la aŭtoro la eblon honorigi la individuajn vivkondiĉojn kaj vivhistorion de la priskribita paciento. Kazraporto povas esti miniaturo aŭ ampleksa diskuto, kiel ekz. la tiurilataj serioj en [NEJM](#). Kuracisto, kiu ĉiutage okupiĝas pri pacientoj, devus esti kapabla tuj verki kelkajn raportojn. Jam pensiitaj gekolegoj tre certe rememoras interesajn kazojn el sia kariero. Ni pensas, ke la arto de kazraporto bezonas revivigon.



Sendu viajn kazraportojn en Esperanto ĝis fino de oktobro al MIR en la de ĝi petita formato. Jen informoj pri la formato:

<https://interrev.com/mir/index.php/mir/about/submissions>. Sendu kopion de via kazraporto al umea@uea.org.

Eble instigu gestudentojn verki kazraportojn en naciaj lingvoj kaj helpu al ili traduki Esperanten! La plej bona artikolo ricevos premion de €150, la dua 100 kaj la tria 50.

Christoph Klawe, UMEA.

===== vortoj: 1305 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de post 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.